Nº 29 NOVEMBRO 85

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO

Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 – 2º andar – Tel.: 232-6309 CEP: 20.211 - Rio de Janeiro - RJ - BRASIL



BEL KAJ BKE: SURVOJE AL KUNFANDIĜO

Kiel programite, okazis, la 26-an de Oktobro, la Ordinara Ĝenerala Kunsido de BEL, kun la ĉeesto de proks. 40 personoj, individuaj membroj kaj reprezentantoj el diversaj aliĝintaj asocioj.


La unua ero de la programo estis la legado kaj aprobo de la antaŭa protokolo. Sekvis prezentado de la projekto de "Regularo pri Balotado" far Jorge Soares das Neves, kiu estis aprobita, kun kelkaj ŝanĝetoj proponitaj de iuj ĉeestantoj. Laŭ tiu aprobita Regularo, oni rajtos baloti ĉeeste aŭ perletere. Poste, okazis la prezentado kaj aprobo de la Buĝeto por la proksima jaro, kiu antaŭvidas enspezojn kaj elspezojn je la valoro de Cr\$ 140.000.000. Pro la alta monata takso de inflacio, oni fiksis la jarkotizon de BEL por 1986 en ORTN, kiuj estos la jenaj:

> M-S: 0,5 ORIN M-1: 1,0 ORTN M-2: 2,0 ORIN D-M:20,0 ORIN

Fine, Prezidanto Marinho transdonis la parolon al Nelson Pereira de Souza, lausajne la proksima prezidanto de BEL, kiu resumis la ĉefajn punktojn de la platformo de la "Porkunfandiĝa Kandidataro":

- Kunfandiĝo BEL x BKE en unusola organizaĵo, nomota BEL, kies ĉefsidejo estos en Brasília

- Enkonduko de Nova Statuto.





KULTURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR DECEMBRO/85

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE BEL 07/12 16a. horo Prelego de hungara s-ano Péter Pál Denke pri la temo "NUNTEMPA HUNGARIO" 17a. horo Prelego de S-ano Adonis M.Saliba pri la temo "NASKIĜMAPO DE ZAMENHOF" 14/12 16a. horo VARIA KUNVENO (informoj, poezio, muziko, anekdotoj, skeĉoj, vortludoj, ktp) 16a. horo 21/12 KUNFRATIĜA KUNVENO (La adiaŭo de la nuna estraro) 28/12 16a. horo

"MONOSILABOJ", DE DIDERTO FRETO

Jam aperis du volumoj de "MONOSILABOJ", la 1-a en 1967 kaj la 2-a en 1972, kun po 108 sonetoj en ĉiu volumo. Nun aperos la kompleta eldono de la verko, kun 1.098 sonetoj, inter ili "Krono el sonetoj el monosilabaj versoj, sen verboj".

"MONOSILABOJ" konsistas el sonetoj el monosilabaj versoj, sen verboj. Ĝi estas unikaĵo en la monda literaturo de ĉiuj tempoj kaj lingvoj.

Pri "MONOSILABOJ" diris William Auld, ke ĝi estas "leginda maloftaĵo". Kaj la verkisto kaj brazila esperantisto Walter Francini skribis: "MONOSILABOJ" estas elstara esperanta verko, kiu riĉigas ne nur la esperantan sed ankaŭ la tutmondan literaturon.

"MONOSILABOJ" estas presata kaj aperos en la unua trimestro de 1986.

NOVAĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PRI BEL

DIPLOMOJ LIVERITAJ EN 1985 (ĝis la 31/10) - Baza: 48; Progresiga: 17; Supera: 03.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ EN 1985 (ĝis la 31/10) - Enspeznotoj: 944; Rembursaj enspeznotoj: 111; Fakturoj: 89; Leteroj: 330.

ALIĜOJ AL BEL en 1985 (stato je la 31/10 - interparenteze, stato je la 31/12/84) M-S: 426 (300); M-1: 155 (147); M-2: 26 (24); D-M: 45 (34); B-M: 03 (04); Entute:655 (509)
ALIĜOJ AL UEA EN 1985 (stato je la 31/10) - MJ: 11; MA: 87; MJ-K: 01; MA-K: 05; Entute: 104

ABONOJ EN 1985 (stato je la 31/10) - El Popola Ĉinio: 49; Heroldo de Esperanto: 32; Internacia Komputado: 17; Kontakto: 13.

KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ KORESPONDPETOJ

- Mi estas 41-jara, hungara agrarinĝeniero. Mi deziras korespondi kun gebrazilanoj. Mi ŝatas historion, turismon kaj vojagojn. Mi kolektas bildkartojn. S-ro Agotai Ede, Újszasz, Konsulte ut.1, -H-5052, Hungario.
- Mi estas 27-jara fraŭlino kaj mi povas skribi pri ĉiuj temoj. Mi kolektas bildkartojn, diskojn, esperantajn librojn kaj diversajn esperantaĵojn: Mamok Krystyna, 43-100 TYCHY, ul. Zawadzkiego 12/150, Pollando.
- Mi estas hungarino dekkvar jara: Lúria Samu, Kaposvár, Koppany-vezer u. 16, 7.400-<u>Hungario</u>.
- Mi nomiĝas Darek kaj mi havas 19 jarojn. Mi loĝas en Nieradowice. Mi tre volus korespondi kun amikino aŭ amiko en esperanto: Gancarz Dariuz, Nieradowice 2, 49-250 OTNUCHOW, Pollando.

ATENTU BONE ATENTU BONE

Pro la jarfina inventario, la Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo ne funkcios de la 23-a ĝis la 31-a de Decembro. Bonvolu ne sendi mendojn dum tiu periodo. Dankon:

ATENTU BONE ATENTU BONE

Orçamento Aprovado p/1986 RECEITA DESPESA Ordinária Pessoal Salarios Anuidades 55.000.000 27.000.000 Prev. Social 5.617.000 Donativos 5.000.000 60.000.000 FGTS 2.160.000 35.000.000 PIS 223.000 Extraordinária 17.000.000 Material de Consumo 30.000.000 Serviço Cursos Serviço Livros 30.000.000 Serviço de Terceiros 10.000.000 Aplic. Financ. Edições Div. 30.000.000 Comissões 5.000.000 Franquia Post. 15.000.000 2.500.000 Congressos 80.000.000 Força e Luz 2.000.000 2.500.000 Diversas 4.000.000 Telefone Rep. eCons. Sede 7.000.000 Aluguéis 23.000.000 88.000.000 Desp. Div. 7.000.000 140.000.000 140.000.000

(Buĝeto aprobita en la Ĝenerala Ordinara Kunsido, okazinta la 26-an de Okt. 85)

BEL informas/nov 85 * Respondeca Redaktoro: Aloisio Sartorato * Eldonkvanto: 1.000 ekzempleroj

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

ESPERANTO-INFORMADO

IBRAHIM SUED, DENOVE, INFORMAS PRI ESPERANTO - Tio okazis, la 5-an de aŭgusto, en sia amaslegata rubriko ĉe ĵurnalo "O Globo".

ESPERANTO ĈE EDUKA TELEVIDSTACIO - La 15-an de septembro, komunikisto Jonas Rezende dediĉis sian ĉiutagan babiladon al Esperanto: "Esperanto: uma resposta à torre de Babel".

PRELEGO PRI ESPERANTO ĈE LERNEJO SOUZA MARQUES, EN RIO DE JANEIRO - La 22-an de Oktobro, S-ano José Rabello de Paula prelegis al deko da instruistoj de la Lernejo Souza Marques, en kvartalo Tijuca, en Rio de Janeiro. Ankaŭ li sukcesis starigi tie ekspozicion pri Esperantaĵoj kaj disdonis informmaterialon al la gelernantoj. Ĉiusemajne, S-ano Rabello disdonas presaĵojn kun informoj pri Esperanto al kvar lernejoj de Tijuca, kie li jam estis preleginta pri la internacia lingvo.

INFORMOJ PRI ESPERANTO EN GAZETOJ DE NOVA FRIBURGO (RJ) - "Correio Friburguense", la 7-an kaj la 12-an de septembro, kaj "Jornal da Serra", la 12-an de septembro, aperigis informojn pri Esperanto senditajn de S-ano Patrick Petiot.

CEFARTIKOLO EN FRAMASONA GAZETO ANKAŬ EN ESPERANTO - En la septembra eldono de "O Preceptor", framasona junulara gazeto, la ĉefartikolo aperis en la angla, hispana, franca kaj ankaŭ en Esperanto. Tutcerte, oni ŝuldas tiun agadon al nia S-ano Ricardo França, unu el la kunlaborantoj de la Redakcio.

INFORMO PRI ESPERANTO EN "O MARAUENSE" - La aŭgusta/septembra numero de "O Marauense", gazeto eldonata en Marau, Bahia, publikigis informan artikoleton pri Esperanto, de S-ro Macário J. Santos, sub la titolo "Só o Esperanto resolve".

ARTIKOLO PRI LA VALORO DE ESPERANTO EN "O REFORMADOR" - La oficiala organo de Brazila Spiritisma Federacio publikigis, en sia septembra numero, interesan artikolon de "Sam Ideano", kiu reprezentis ideojn de Ismael Gomes Braga pri la valoro de Esperanto en la hodiaŭa mondo por la disvastigo de la spiritisma doktrino. La artikolo titoliĝas "Linguas e Religiões".

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "REVISTA AAFBB" - "Esperanto: uma solução para a Babel linguística", de Ruy de Albuquerque estas la artikolo publikigita en "Revista AAFBB", oficiala organo de la Asocio de Eks-Oficistoj de Banco do Brasil, en sia eldono aprilo-sept/85.

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN REVUO "CONTATO" - La julia/aŭgusta numero de la Revuo CONTATO, oficiala organo de la "Associação de Pilotos da VARIG", publikigis tre trafan kaj objektivan informartikolon pri Esperanto. Ĝia aŭtoro: Cop. Elias Ribeiro do Nascimento. "Esperanto-Noticias" de novembro/85 republikigos ĝin.

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "BOLETIM DO SEVRE" - La septembra numero de "Boletim do SEVRE", oficiala organo de la Ingeniera Sindikato de Volta Redonda, publikigis tre interesan informartikolon pri Esperanto, sub la titolo "O engenheiro brasileiro e as linguas". Ĝia aŭtoro estas nia S-ano Alberto Flores, kiu sendis fotokopion al ni.

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "CORREIO POPULAR", DE CAMPINAS (SP) - Sub la titolo "Esperanto, lingua mundial, é praticado em Campinas", la 17-an de Oktobro, aperis trafa raportaĵo pri Esperanto en "Correio Popular", ĉiutaga gazeto de Campinas (SP), kun ĝeneralaj informoj pri la lingvo kaj movado kaj la praktika utiligo de la idiomo en la hodiaŭa mondo. Transdonis la informojn al la ĵurnalo, S-anoj Ivanhoé Rodrigues Baracho kaj João Manoel Aguilera Júnior. Tiu lasta sendis al ni la fotokopion de la raportaĵo.



La gazeto "Espaço Democrático", de la 1-a ĝis la 7-a de no vembro 85, publikigis la ĉi-supran ŝercdesegnaĵon de Mari ano, kie aperas Prezidento Sarney demandante al Deputito Pimenta da Veiga, ĉefreprezentanto de la situacia partia ro ĉe la Ĉambro de Deputitoj:

"Ĉu vi parolas Esperanton?"



Okaze de la Ĝenerala Ordinara Kunsido de BEL, okazinta la 26-an de Oktobro, S-ano Ivon Barbosa (maldekstre), la Ĉefdelegito de UEA en Brazilo, enpostenigas la novan delegiton de UEA, en Rio de Janeiro, S-ano Aloísio Sartorato (centre). Dekstre, aperas S-ano Marinho, Prezidanto de BEL.

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

ESPERANTO-INSTRUADO

NOVA KURSO DE ESPERANTO ĈE USP/SÃO CARLOS - S-ano Aristóphio A.A. Filho informas nin pri la komenciĝo, la 19-an de septembro, de nova baza kurso de Esperanto ĉe USP/São Carlos. Anoncoj pri la kurso aperis en loka gazeto ("O Diário") kaj en la bulteno de la Universitato "Semanário EESC".

KURSO DE ESPERANTO ĈE OFICIALA INSTANCO EN UBÁ (MG) - Laŭ informo sendita al ni de S-anino Edina de Barros Reis, nuntempe, ŝi instruas al 17 gelernantoj ĉe "Casa de Cultura de Ubá", oficiala institucio de la Prefektujo de Ubá.

ESPERANTO KURSO EN PROFESIA LERNEJO DE ACESITA, MG - Ekde la 21-a de Oktobro, funkcias intensiva Esperanto-kurso ĉe la Profesia Lernejo de Acesita, laŭ informoj al ni senditaj de S-ano Adonis M. Saliba.

DIVERSAJ

PATRICK PETIOT PREZENTAS EN KULTURKUNVENO DE BEL PROJEKTON PRI "INTERNACIA KODO POR ŜILDOJ PRI SANO - S-ano Patrick Petiot prelegis, la 14-an de Septembro, en la sidejo de BEL, pri "Internacia Kodo por Ŝildoj pri Sano" kaj "Praktikaj Uzoj de Esperanto Dum Vojaĝoj". La unua temo pritraktis projekton, kiun Patrick prezentos dum la Centjara Jubileo de Esperanto, per kiu li proponas la kreadon de kodo internacie komprenebla por ŝildoj (=tabuletoj pendigitaj super butiko aŭ gastejo kun signoj aŭ skriboj anoncantaj la specon de komerco) pri sano. Detalo, tamen, estas rimarkinda: lia metodo estas la sama, kiun Zamenhof uzis por krei Esperanton, t.e., la aposteriora metodo. Por realigi la projekton, li devis arigi multajn fotojn de ŝildoj el la tuta mondo per helpo de Esperantistaj korespondantoj. Laŭ li: "Se Zamenhof kreis logikan parolatan lingvon, mi kreos desegnan lingvon per la sama metodo". Due, S-ano Patrick parolis pri siaj spertoj rilate la E-movadon. Li rekonis la grandan utilecon de Pasporta Servo, de Esperantistaj Organizoj kaj de la internacia korespondado sed aliflanke montris realisman opinion pri aliaj sektoroj de la movado. Li klopodis analizi la kialon, pro kiu ekzistas hodiaŭ "eks-E-istoj". Li diris, ke estas malfacile akceptebla la fakto, ke oni volas fariĝi Delegito sed ne povas pro malbona administrado de la Servo aŭ ke, kiam oni skribas al Delegitoj, sendante Internacian Respondkuponon, oni plurfoje ricevas neniun respondon! Tamen, li konkludis,ke Esperantismo estas bela idealo kaj, ke li ne intencas forlasi la Movadon.

FONDOTA ASOCIO DE ADVENTISTAJ ESPERANTISTOJ - S-ano Otaviano Curvelo de Souza petas al ni la diskonigon de la jena informo: "Esperantistoj kiu planas fondi asocion de adventistaj Esperantistoj atendas leteron de kunlaborantoj: Kjell Peder Hoff, Bjorkenes, N-1970 HEMNES i HOLAND, Norvegio".

PLENE SUKCESINTA LA UNUA RENKONTIĜO DE LA ESPERANTISTOJ DE FEDERACIA DISTRIKTO - La 31-an de aŭgusto, okazis, en Gama, satelita urbo de Brasilia, la Unua Renkontiĝo de la Esperantistoj de Federacia Distrikto, kun la partopreno de 130 personoj. Interalie, oni fondis GAMEK, Gama Esperanto-Klubo (Laŭ informo aperinta en "Tagiĝo", sep 85).

ESPERANTO-RADIPROGRAMO EN BRASÍLIA - Jen informo aperinta en la supre citita gazeto: "Ĉiusabate, je la 15-a horo, okazas, ĉe "Brasília Super Rádio FM e Estéreo", la programo "Noticoj pri Esperanto, La Internacia Lingvo". La unuan de Septembro, ankaŭ en tiu sama radistacio okazis dissendo de Esperantaj Kanzonoj dum duonhoro. Poste, multaj aŭskultantoj telefon sal la stacio petante informojn pri Esperanto kaj ankaŭ ripetiĝon de la programo".



2-a BAHIA RENKONTIĜO

Kelkaj partoprenanto:
de la Dua Regiona Regiona Regiona Regiona de la Dua Regiona Regiona Regiona Regiona de Esperanto okazinta la 11-an kaj 12-an de Oktobro 85, en la urbo Muritiba, La foto estis farita antaŭ la Bieno "Cabe ceiras", naskiĝloko de Castro Alves, fam brazila poeto. (Laŭ informo de S-ano Mar celo F.C.da Rocha).